

Kavka, J. (1978): Esperantigo de la ĉeĥoslovakaj loknomoj. - Scienca Revuo, 119-128. Ĉapeko.
Kavka, J. (1980): La fonemo Ĥ kaj ties transformoj en la internacia scienca leksikologio. - Kolekto de la seminariaj referaĵoj: Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko, 93-100, Ŭsti nad Labem.

Kavka, J. (1981): Onomastiko en fakterminoj konsidere ilian esperantiĝon. - Kolekto de la referaĵoj de konferenco Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko. 1,6-14. Ŭilina.

PAG: *Kalocsay, L., Waringhien, G. (1982): Plena analiza gramatiko de Esperanto. Kvara, tralaborita, eldono. - U.E.A. Rotterdam. ISBN 92 9017 022 D. [fuŝaj prononc-indikoj: p. 39-49.]*

Pilger, W.F. (1983): Kelkaj pensoj pri Esperanto kiel maŝintraduka ponto-lingvo. - Vulpo-Libro. Lelystad. ISBN 90 70074 33 8.

PIV: *Plena ilustrita vortaro de Esperanto (1970). Ĉefred. G. Waringhien. - Sennacieca Asocio Tutmonda. Paris.*

PM: *Poŝatlaso de la mondo (1971). Kartografie n.p. Praha.*

Seppik, H. (1974): Propraj nomoj en Esperanto. - Scienca Revuo, 73-80. Beograd.

UEA-JL: *Jarlibro 1982. - Universala Esperanto-Asocio. Rotterdam. ISSN 0075-3491.*

8. Konsultitaĵoj (i.a.):

Statistisch zakbosk 1980. Centraal Bureau voor de Statistiek. - Staatsuitgeverij. 's-Gravenhage. ISBN 90 12 03021 B. (tab. 13 por komunumo-nomoj kaj loĝanto-nombro)

Handboek van de nederlandse pers en publiciteit 81/oktober (1981). 56e uitgave. - Nijgh Periodieken. Schiedam. (por adjektivoj de loknomoj en gazetaj titoloj)

Viries, J. De (1958): Etymologisch woordenboek. - Spectrum. Utrecht/Antwerpen. ISBN 90 274 4812 4. (por etimologio de loknomoj)

Problemer bij het aanpassen van nederlands(talig)e plaatsnamen aan het Esperanto

In verschillende — literaire, toeristische, wetenschappelijke — teksten bestaat de behoefte aan bijvoorbeeld bijvoeglijke naamwoorden van plaatsnamen. De meeste Edammer kaas komt immers niet uit Edam, een Leidse fles is niet een fles uit Leiden, en Maastrichtse kalksteen ligt ook bij Valkenburg.

In het Esperanto bestaat dan, evenals in andere talen, de noodzaak om de naam te assimileren. Vormen als "Maastricht-a", "Leiden-a" kunnen optisch voldoende zijn, maar zij zijn onuitspreekbaar. Niet allen omdat de kennis van de Nederlandse uitspraak en spelling ontbreekt, maar ook omdat bijv. de verschoven klemtoon de oorspronkelijke uitspraak vaak eenvoudigweg onmogelijk maakt. De enige oplossing is dan: assimilatie, aanpassing aan het klanksysteem en de spelling van het Esperanto.

Om verschillende redenen bestaat er een weerstand tegen assimilatie van (plaats)namen. Gewoonlijk niet voor wat betreft die uit vreemde landen, maar vooral voor wat de namen uit het eigen land betreft. De tegenstand is des te groter, naarmate de geassimileerde vorm afwijkt van de oorspronkelijke. Toch moet men rekening houden met de behoeften van mensen uit andere landen die ook over Nederlandse en Vlaamse specialiteiten willen praten!

Dit artikel geeft enkele suggesties betreffende de aanpassing van nederlandstalige plaatsnamen aan het Esperanto, voor de gevallen waarin hiertoe de noodzaak bestaat. Voor enkele elementen (ui, ij) worden twee verschillende wegen aangegeven: die van de "spontane" assimilaties, en één, die meer rekening houdt met zowel het klanksysteem van het Esperanto als met de etymologische achtergrond van de namen.

La esenca karaktero de la propraj nomoj

Senca kategorio kaj (inter)nacia formo

*Manuel Gomes (Portugalio)**

1. Enkonduko

Tiu ĉi studo estas kvazaŭ daŭrigo de alia preskaŭ samtitola (*Gomes 1975*). La tempospaco inter la datoj servis por pliprecizigi iujn atingitajn nociojn, tiam nur prezentataj.

Fakte, kvankam mi tiam jam konsciis pri tio, kio la propraj nomoj ne estas, mi tamen ankoraŭ ne konsciis tiom nete pri tio, kio ili vere estas.

Do, kaj ĝis ia punkto, la referencita artikolo estas kvazaŭ la taŭga enkonduko por la ĉi-nuna, kie estas dediĉita pli detala spaco al la "esceptoj" (aŭ "subreguloj").

2. Plano por tiu ĉi studo

En la unua parto oni studos tion, kio estas la propraj nomoj en la limoj de la sencosignifa gramatika nomenklaturato.

En la dua parto oni studos la formojn de la propraj nomoj ekde iliaj (inter)naciaj skribaspektoj, kaj pri tiuj oni klopodas montri la eltroveblajn internaciajn normojn, kiujn same la naciaj lingvoj pli-malpli respektas spite iliajn lim-konceptojn pri la "universaleco".

Fine, en konkluda parto, estas prezentataj iuj konsideroj pri pli larĝa nocio de asimilado, je adapto kaj adopto de la nom-formoj.

3. Pri tio, kio sence la propraj nomoj estas

3.1. La propra nomo estas "titolece distinga" (kaŭzo mem por la uzo de komenca majusklo)

Tio signifas, ke la propra nomo estas aldone kaj titolece metita al unu komuna nomo inter variaj, por ĝin nome distingi el ĉiuj aliaj samspecie komunaj. La ĝenerala uzo de la komenca majusklo, kiu ne povas esti neata aŭ nuligata, eĉ se iuj verkistoj ne ĝin uzas, estas pruvo pri la titoleca distingo.

* 9970 SANTA CRUZ, Flores, Aĉores

Aparte pri la uzo de la komenca majusklo estas ankaŭ dirende, ke se ĝi estas skribindikilo por la “propra” nomo, ĝi ne perdas sian “propran” kvaliton, kiam la propra nomo estas uzata senc-derive aŭ kombinsence. Ekz.: Dirante “ĉina inko”, oni fakte konscias pri la “komuna” nomo “ĉina”, kiu fariĝas “propra” en Ĉinio, kaj ankaŭ pri tio, ke la “ĉina inko” estas tia eĉ sen pripenso al la citita lando.

Sed dirante “Davida trono”, la majusklo devas esti uzata, ĉar ĝi rilatas precize al la propra nomo “David”. Ĝi, “la trono”, ne estas “davedeca” (kvazaŭ komunsenca rilato), sed de “David” (apartenrilata, simile al genitiva funkcio de la propra nomo).

3.2. La propra nomo estas “propra” (kaŭzo por la konservativismo de la formo)

Tio sencas, ke la propra nomo estas “sia”, kaj tiu fakto estas konservativisme identa al si mem, ĉu internacie rilate eksterlandajn naciojn de la origino de propraj nomoj, ĉu interne de sama nacio, konsidere al diversaj kaj specifaj kutimoj sociaj de la koncernaj landoj. Tie la propraj nomoj ĝenerale ĝuas “proprajn” (= siajn) formojn, kaj ne malofte ili multe malsamas rilate la kutimajn fonetikajn uzojn de aliaj vulgaraj lingvoj. Ni citu ekz. la nomojn *Glasgow, York, Nancy ...*, kiuj prefere eksterlandas samforme eĉ en landoj, kie ne uziĝas ties fonetikaj sistemoj.

Ankaŭ rilate la familiajn nomojn de personoj ni scias, ke tiuj estas enmigre konservataj eĉ dum jarcentoj en la landoj de alveno. Estas citenda la ekzemplo de la bapta kaj familia nomoj de la fama aŭto-sportisto *Nelson Piquet*, kiu estas respektive angla kaj franca formoj de la nomo de brazila homo, kies nacia lingvo estas la portugala.

Konsekvence sentiĝas, ke la internaciaj reguloj estas parte ekzistantaj eĉ en la kadro de la naciaj lingvoj, kiuj do akceptas en si mem pli larĝan aŭ esceptan sisteman spacon fonetikan, ĉu por siaj propraj nomoj, ĉu por la fremde devenaj.

3.3. La propra nomo estas “epitete atributa” (adjektive funkcia rilate la implicon, pri kiu ĝi epitetas)

Fakte la propra nomo ne estas simila al alia komuna substantivo, ĉar ĝi estas “atribute” donita al precize nur unu inter pluraj por ĝin distinge rekonigi, kiel nome nur la indikitan kaj ne alian de la sama komuna specio. Vere la komuna substantivo nomas la speciajn unuojn pro ilia materia konsisto

mem, sed la propra nomo aperas nur poste, por “propre” aplika “atribuo”.

Tiu baze epiteta senco de la propra nomo funkcias simile al samkondiĉa adjektivo, kiam ĝi kvalifikas substantivan implicon, ekz.: “La blindaj ne povas vidi”, sen neceso diri: “La blinduloj...”.

La supera kvalito de la propra nomo rilate la adjektivon konsistas en tio, ke ĝi estas titole epiteta por nomdiri precize nur unusolan de la tuta specio. Tio do plene faciligas sian anstataŭan reprezenton de la implica komuna nomo kaj tio estas ĝia ĝeneraligita karaktero por la specifa gramatika klaso de la propraj nomoj.

Tamen tiu duobla ambaŭvalideco de la propraj nomoj (respektive epiteta kaj implica), ne evitas, ke la komuna nomo ankaŭ kunaperu, kvankam kvazaŭ pleonasme, nenecese, ekz.: la “urbo” Toledo; la “rivero” Elbo; la “filozofa” Aristotelo.

La sekvanta kadro montras, ke la atributa funkcio de la propra nomo rilate sian implicon egale evidentiĝas, ĉu en la adjektiva, ĉu en la substantiva formo:

Malaga = Malag/nom/a (“urbo”) = Malaga (urbo) = (“urbo”) Malaga
 Toledo = Toled/nom/a (“urbo”) = Toled(urbo)o = (“urbo”) Toledo

 en Malaga (adjektiva formo), la implico “urbo” estas subkomprenata ekstere, flanke de la propra nomo (simila al senkondiĉa adjektivo)
 en Toledo (substantiva formo), la implico “urbo” estas subkomprenata interne de la propra nomo (inter ĝia radikalo kaj la fleksia -o)

3.4. La propra nomo estas kvazaŭ “pronomo” (“propra” eblo anstataŭi la implican komunan nomon)

Estas tre malgranda kategoria diferenco inter la propraj nomoj kaj la gramatika klaso de la pronomoj. Oni eĉ povas diri, ke la “propraj nomoj” estas “pronomoj”, ne nur “pro” la nomoj, sed ankaŭ “por” ili, same kiel la gramatike nomataj “pronomoj”.

Se unuflanke la “atributeco” de la propraj nomoj ligas sian kategorion al la gramatika klaso de la komunaj nomoj (ambaŭe substantivaj kaj adjektivaj), aliflanke ilia “implica” funkcio ilin ligas al la gramatika klaso de la pronomoj. Oni scias, ke eĉ en la klaso de la pronomoj, iuj el ili nomas la nomojn esklude nur substantive, ekz. mi, ĝi, dum aliaj rilatas la implican nomon ankaŭ adjektivece, ekz. tiu (homo).

Fakte la diferenco inter la pronomoj kaj la propraj nomoj estas nur la in-

dikata en la sekvanta kompara kadro:

La pronomo indikas “montre” (pozici-rilate) la implican nomon
 La propra nomo indikas “atribute” (nomdistinge) la implican nomon

Rimarkable, ke la pronomoj ĝuas por si specifajn tradiciajn formojn, ĝenerale ne laŭ la precizaj modeloj de la komunlingvo nacia. Tamen pri la propraj nomoj, tiu fakto eksteriĝas rilate la nuran nacion kaj emas eniri en la kadron de la internacieco de la formo!

3.5. Konkludo rilate la unuan parton (pri la funkci-senca karaktero)

kaj enkonduko al la dua parto (pri la formo de la propraj nomoj)

Pro la konsideritaj faktoj evidentiĝas, ke la libero, kiun la esperantistoj havas por uzi la naciajn formojn de la propraj nomoj en la esperanta teksto kaj kiujn ili fakte preferas, laŭ la plejparto de la aŭtoroj por la plej altaj celoj de fidindeco kaj seriozeco de la verkoj, tio ja enhavas la enorman “regulmason” por la konstatebla (inter)nacia normeco spite ilian ŝajnan sennormecon internan.

Tiun ĉi studon oni faras en la konscio pri la originoj de Esperanto, ĉar ni scias, ke la propraj nomoj same kunestis en la materia bazo por la kreo de nia Lingvo, ĝin kunfundamentigante.

Tamen tiuj konstateblaj normoj de la propraj nomoj neniel estas aktivaj reguloj pri iu aŭ alia pli konvena formo; male, ili estas pasivaj reguloj, kiuj akceptas la (inter)naciajn formojn kaj diktas, jes, sed nur al nia internacia menso, la konstaton de la normeco. La kreopovo de la formoj sekure apartenas nur al la nacilingvoj, tiupunkte la bazo de la koncerna internacieco.

4. Pri la formo de la propraj nomoj

4.1. Enkondukaj konsideroj

4.1.1. Pri la konservativismo de la nomformoj

Pro tio, ke la kategorio de la propraj nomoj estas tia, ke ĝi akompanas la nomaton tra ĝia internacia disvastigado, tio do okazigas diversajn fonetikajn komplikojn en la kadro de la naciaj lingvoj, kiuj iagrade emas akiri la fremdajn alinaciajn formojn de iliaj propraj nomoj, se ne plene grafisme, almenaŭ prononce; se ne plene laŭ la komunlingva sento, almenaŭ sub konstateble pli larĝa fonetika kampo.

4.1.2. Pri la (literaj) sonelementoj de la nomformoj

Oni scias, ke la literoj (vokaloj kaj konsonantoj) supoze estas la nuraj gra-

vaj elementoj, okazigante la vortformon de la nomoj. Tiu aspekto de la internacia formo estas jam sufiĉe pritraktita aliloke (*Gomes 1982*), kie oni emas konduki la universalan interpreton de la (inter)naciaj grafismoj, maniere ke la diversaj fonetikaj faktoj elire ekde la nacia komunkomprena flanko science sistemiĝu internacie ĝis renkonto en la asimiladon, kio ja estas la alia flanko de la internacieco de la formoj de la propraj nomoj.

4.1.3. Pri la tonelementoj de la nomformoj (Regulo pri la internacia akcento)

La regulo pri la akcento en Esperanto estas, ke ĝi lokiĝas sur la antaŭlasta silabo de la vorto. Tio do evidentiĝas la bazan internacian principon (akceptitan en Esperanto), ke fakte la akcento estas sur la lasta vokalo de la radikalo, la posedanto de la senco.

Tiu maniero akcenti la vortojn intime rilatas al la fleksia principo de ĉiu vorto aparte. Alia sistemo akcenti la vorton je alia direlemento, estus sub la emfaza kvalita principo de senco, ĝi do estus kvazaŭ fraz- aŭ senc-akcento.

Prenante kiel ekzemplon la vorton *Nelson* se oni ĝin dirus *Nélson*, tio kondukus al “Nelso” (kiel *Otton* al Otto); sed ne oni diros *Nelsón*, tio kondukos al Nelson’, laŭ la Esperanto-sistemo, retenante la radikalano “n”, ĉar la finkonsonanto estas konvene ĉiam legata en Esperanto, eĉ kiam ĝi (ekz. *Piquet*) estas nacie eventuale muta kaj uzata nur por akcentigi la antaŭan vokalon.

4.1.4. Distingo de la elementoj en la nomformoj (Regulo pri la “korpo” kaj “vesto” de la nomoj)

Laŭ la regulo de la akcento oni trovas en multaj propraj nomoj du apartajn elementojn, kiuj ankaŭ povas ricevi apartajn nomojn, tiel:

— Unu el tiuj partoj estas la esenca elemento, la “korpo” mem de la nomo, kiu krom la akcento, kaj eĉ pro tio mem, havas la signifan senco de la propra nomo, estante do ĝia neŝanĝebla parto.

— La alia parto de la nomo, simpla vokalo post la akcento, kaj eĉ ne ĉiam aperanta, estas ĝia akcesora elemento, kiu ne akcentita kaj ne sencodona, estas facile forfalema, donante sian (fleksian) lokon al aliaj elementoj. Ĝi do estas kvazaŭ la propra “vesto” de la propra nomo ...

5.1.5. Pri la formo de la nomelementoj (t.e. de la “korpo” kaj “vesto”)

La t.n. “korpo” de la nomo (la akcentita, sencohava, neŝanĝebla parto) povas esti konsonantforma, se ĝi finiĝas per konsonanto (post la akcentita vokalo), ekz. *Madrid* kaj *Toled/o*, aŭ vokalforma, se ĝi finiĝas per ĝia akcentita vokalo (do ne havante plusan konsonanton), ekz. *Panamá*.

Sume la propra “vesto” de la nomo povas ricevi diversajn klaseblajn nomojn, kiujn oni tamen disdiros tra la sekvantaj paragrafoj, kiam oni tiesrezulte prezentos la diversmaniere klasitajn proprajn nomojn.

4.2. La diversaj formoj de la propraj nomoj

4.2.1. Nomoj de konsonantforma “korpo”

4.2.1.1. La “nudform)aj” nomoj

Tre granda kvanto de la konsonantformaj nomoj havas nur la esencan parton, do nur la “nud-forman korpon”, sen iu ajn akcesora neakcentita vokalfinaĵo poste.

Tiu tre abunde aperanta internacia formo respondas al la komunlingva uzo de la apostrofo ĉe la komunaj nomoj. Tamen tiu eventuala “komuna” procedo estus neoportuna rilate la proprajn nomojn pro tio, ke ĝi (la apostrofo) ne estas ĝia “propra” internacia form-elemento; kaj ankaŭ pro la neceso mem front-al la internacia akcento-regulo de la vortlegado.

Fakte la apostrofo indikas la forfalon de “o” kaj en tiu tipo de la internaciaj formoj de la propraj nomoj la fina “o” ne povas forfali, se ĝi ne estus unue aldona (por sekve forfali!), kio estus ridinda komplikoj por la sufiĉa facilaj.

4.2.1.2. La diversforme “vestitaj” nomoj

— La funkci-rilataj nom-“vestoj” (*o, a, e*)

La neakcentitaj “propraj” finaĵoj *o, a, e* estas, koncerne la “korpon” de la nomoj, iliaj “propraj vestoj”, respektive “vira, ina, neŭtra” ne pro iu ajn seksrilata senco, sed pro funkcia senco paralela rilate la implicon.

La propra nomo estas “vir-vestita”, kiam ĝi estas en substantiva formo (ekz. *Toledo*), plene okupante la lokon de la implico, pri kiu ĝi estas “propra” atributo.

La propra nomo estas “in-vestita”, kiam ĝi aperas adjektive (ekz. *Málaga*), do en ĝia vere atributa formo, eĉ pli indikante sian rilaton al la koncerna komuna implica nomo.

Fine la propra nomo estas “neŭtre vestita”, kiam ĝi finiĝas per la preskaŭ muta vokalo *e* (ekz. *Brisbane*), konsidere ke ĉe tiuj nomoj nur la finaĵo (kiel tia) estas “fremda” al Esperanto, ĉar la “korpo” de la nomo estas simple tiom “propra” kiom ĉe alifinaĵa nomo. Tiu lasta (neŭtra) formo ne multe diferencigas de la “nudformaj” nomoj, ĉar la nacie preskaŭ muta *e* ne estas pli ol apoga postlegaĵo por la “korpa” finkonsonanto. Tamen funkcie, la nomo estas pli en sia atributa senco, do pli responde al la adjektiva senco-formo.

Subregulo (pli bone ol escepto) por la pli kurtaj nomoj:

Kiam tiutipaj nomoj estas mallongaj, kvazaŭ unusilabecaj, kaj kiam oni devas aldoni al ili alian sencelementon, ili prefere konservas siajn “korpajn” vestojn” (ekz. “Oslo/ano”). Tiu fenomeno donas al ili la aspekton kaj kategorion de “kunvestitaj” nomoj. Estas pli bone simple konsideri la fakton en si mem kiel subregulon, ol nomi ĝin escepto.

— La ne funkci-rilataj finvokaloj (*i, u*)

Por la nomoj finiĝantaj je *i* aŭ *u*, ni same trovas du regulojn laŭ la longeco de la propraj nomoj:

Por la longaj nomoj, tiuj senakcentaj finaĵoj same estas fremdaj kaj oni povas ilin rilatigi al iu de la antaŭe menciitaj funkci-rilataj vokaloj tiel: *i* rilatiĝas al *e*, siavice al *a*, sed *u* povas sin kompari al *o* (ekz. *Helsinki, Kathmandu*).

Sed la pli kurtaj nomoj (kiel *Dili* kaj *Kivu*) same respondas al la antaŭe diritaj kvazaŭ unusilaboj. Ĝenerale ties “korpeca” finvokalo eĉ povas ricevi la akcenton lastsilabe, sur la *i* aŭ *u*, kaj pro tio la finvokalo ne estas ŝanĝebla “vesto”, sed estas “korpeca” elemento en senpera kontakto kun la ekstero. Pro tio ili do iĝas kvazaŭ “nudvestitaj” nomoj, kiel tiuj de la sekvanta kategorio.

4.2.2. Nomoj de vokalforma “korpo”

Iuj el ili estas “nud-vestitaj”, se post la akcentita vokalo ne venas alia vokalfinaĵo. Estas tiaj, la unusilaboj kiel *No* kaj la nacie signakcentitaj, kiel *Marajó*. Paralele inkluditaj estas ankaŭ la jam menciitaj kurtaj nomoj finiĝantaj je *i* aŭ *u*.

Aliaj tiaj nomoj estas “sur-vestitaj”, kiam post la akcentita korpvokalo venas alia neakcentita vokalo, kiu estas forfalema “vesto” de la nomo (ekz. *Bilbao, Dundee*).

Se tamen tiu dua neakcentita vokalo funkcias duonvokale aŭ se ĝi eĉ estas *y* aŭ *w*, tiam tiuj nomoj iĝas “mis-vestitaj”, ĉar la duonvokalo formas diftongon kun la antaŭa “korp”-akcentita vokalo. Tiam la duonvokalo ne plu estas forfalema, ĉar ĝi funkcias konsonantece; la nomo do iĝas identa al la “nudformaj” nomoj (ekz. *Uruguay, Niterói*).

Fine, se post la formiĝinta diftongo venas ankoraŭ alia forfalema, neakcentita “propra” “vest”-vokalo, la nomo eble nomiĝas “kromvestita” kaj en ĉio ĝi estas analoga al ĉiuj funkcie “vestitaj” nomoj (ekz. *Nagoya*).

4.2.3. Aparte pri la neakcentitaj silabece pecaj finaĵumoj

Estas iuj propraj nomoj, kies tutsilaba finpeco estas neakcentita forfale-

ma finaĵumo. Oni parolas pri tiuj nomoj finiĝantaj per *-as, -es, -is, -os, -us* (neakcentitaj); same pri iuj finiĝantaj je *-en, -on* kaj ankaŭ aliaj finiĝantaj per *-um* (ĉiuj neakcentitaj).

Ilin rilate oni havas subjektivajn malsame kontraŭajn vidpunktojn, kiam oni pretendas ilin asimili en Esperanto, ĉu konservi, ĉu faligi tiun finpecon de la internacia nomo, t.e. ĉu akcentigi aŭ ne akcentigi ĝin, maniere ke ĝi estu aŭ ne estu "korpopeco". Plej ofte estas la longeco aŭ mallongeco de la nomo, kiu decidas respektive kaj inverse pri ĝia malstabileco aŭ stabileco. Kiam la nomo estas de insularoj aŭ de montaroj, tiam la asimilado fariĝas per pluralo en Esperanto.

En ilia (inter)nacia formo, la neakcentita finaĵumo estas ĝia "propra" "vestumaĵo", kiun oni konsideru fakto mem kiel tia, kaj pri kiu oni pluvidos aliĉapitre.

Aliaj propraj nomoj de iuj lingvoj prezentas la "finaĵumojn" *-er, -el*, sed tiuj en la asimilado kutime lasas forfali nur la *e* kaj enkorpiĝas en la radikalon la konsonanton (ekz. *Sosipater*).

4.3. Resumaj kadroj

La konsonantformaj klasitaj ekzemploj

Kadro de nud(form)aj nomoj:

<i>Zagreb</i>	<i>Ararat</i>	<i>Hamburg</i>	<i>Halifax</i>
<i>Jozef</i>	<i>Madrid</i>	<i>Winnipeg</i>	<i>Suez</i>
<i>Stanislav</i>	<i>Budapest</i>	<i>Minsk</i>	<i>Lodz</i>
	<i>David</i>	<i>York</i>	<i>Metz</i>
	<i>Judit</i>	<i>Hong-Kong</i>	<i>Thomas</i>
		<i>Viborg</i>	<i>Orleans</i>
			<i>Flims</i>
<i>Viktor</i>	<i>Bristol</i>	<i>Jerusalem</i>	<i>Hamilton</i>
<i>Ulster</i>	<i>Istanbul</i>	<i>Amsterdam</i>	<i>Jordan</i>
<i>Gibraltar</i>	<i>Samuel</i>	<i>Stockholm</i>	<i>Bremen</i>
<i>Nagpur</i>	<i>Emil</i>		<i>Simeon</i>
			<i>Verdun</i>

Kadro de la "pervestitaj" aŭ "memvestitaj" nomoj

"funkci-vestitaj" (= forfale vestitaj) "nefunkci-vestitaj"
(alnome vestitaj) (= vastvokale vestitaj) (univestitaj)

"o-vestitaj" (vir-	"a-vestitaj" (in-	"e-vestitaj" (neŭtre-	"i/u-vestitaj"
<i>Toledo</i>	<i>Malaga</i>	<i>Brisbane</i>	<i>Helsinki</i>
<i>Toronto</i>	<i>Betesda</i>	<i>Irene</i>	<i>Nagasaki</i>
<i>Mondego</i>	<i>Nicola</i>		<i>Taegu</i>
<i>Cicero</i>	<i>Helena</i>		<i>Paysandu</i>

(kurtaj, "kunvestitaj, kvazaŭ unusilaboj) "uni-vestitaj"

<i>Ivo</i>	<i>Olga</i>	<i>Kôbe</i>	<i>Dili</i>
<i>Togo</i>	<i>Parma</i>	<i>Lille</i>	<i>Levi</i>
<i>Ebro</i>	<i>Gaza</i>	<i>Tete</i>	<i>Kivu</i>
<i>Ryuko</i>	<i>Jona</i>	<i>Nice</i>	<i>Derby</i>
<i>Kyoko</i>	<i>Volga</i>		<i>Nancy</i>
	<i>Anna</i>		

Rim.: La terminoj "alnome" kaj "uni-" estas povokale, ankaŭ signifosence kaj vortkonsiste, intue mnemonikaj.

"per-" aŭ "mem-vestitaj" nomoj estas tiuj akceptataj en iliaj (inter)naciaj "propraj" "vestoj" (ekz. *Toled/o, Malag/a, Brisban/e* kaj ankaŭ *Oslo/ano, Levi/*.

Siavice *Toront'* aŭ *Baltimor'* estus "devestitaj".

Nomoj kiel *Madrid/o* estus nomataj "prunte vestitaj"

kadro de la vokalfarmaj nomoj

vokalfarmaj		diftongformaj	
“nud-vestitaj”	“sur-vestitaj”	“mis-vestitaj”	“krom-vestitaj”
<i>No</i>	<i>Bilbao</i>	<i>Bombay</i>	<i>Nagya</i>
<i>Panamá</i>	<i>Montevideo</i>	<i>Niterói</i>	<i>Pistoia</i>
<i>Marajó</i>	<i>Kaspio</i>	<i>Kraków</i>	
<i>André</i>	<i>Lisboa</i>	<i>Gronau</i>	
<i>Malmö</i>	<i>Erie</i>	<i>Berkeley</i>	
<i>Golegã</i>	<i>Jeremia</i>	<i>Glasgow</i>	
		<i>Andrew</i>	
		<i>Sydney</i>	
		<i>Uruguay</i>	
		<i>Viseu</i>	

Kadro de specife “vestumajitaj” nomoj

-as, -os	: <i>Amazon(as)o, Lagos(o)</i>
-es	: <i>Gang(es)o, Eufkrat(es)o, Diogen(es)o, And(es)oj</i>
-us, -is	: <i>Sirt(is)a</i>
-en	: <i>Lofot(en)aj, Groning(en)a, Soling(en), Dresd(en)</i>
-on	: <i>Ascensi(on), Réuni(on)</i>
-er	: <i>Dov(er)o, Ulst(er)o</i>

5. Pri la analiza asimilado de la propraj nomoj

5.1. La dudirekta asimilado

La antaŭaj ĉapitroj studintaj la proprajn nomojn en iliaj senco kaj formo neniel estas kontraŭ la asimilado, sed male, eĉ pretendas trovi pli konsciajn principojn pri ĝi. Oni tamen devas kompreni la asimiladon dudirekte:

— Unuflanke, ke la (inter)nacia formo de la propraj nomoj ekde origine transformiĝe venas renkonte al la komuna internacia lingvo.

— Aliflanke, ke estas la internacia komuna lingvo, kiu laŭpove iras fonetike pli amplekseble renkonte al la formoj de la propraj nomoj. Oni komprenu tion el la sekvantaj ekzemploj: *Otto*, Finnlando, *Gallo*, vatto (duoblaj literoj); *Betsaido*, Dĵakarto (ne “c”, “ĝ”); *Bakho*, Budho, Gheto, Pirho, mirho (kun “ĥ”, “h”); *Marsejlo*, sed *Bolonjo* kaj *Magnol...* kiel gajno, kampanjo, digno.

Estas evidente, ke tio portas akomodan elastan fonetikan eblon al nia lingvo, ĉu interne de si mem, **adaptante** la proprajn nomojn per ilia transformado ĝis la plej vulgare normoj de la komuna lingvo, fakto, kiu ne malofte de-

formas la nomojn; ĉu ekstere, ilin **adoptante** per akomodado de nia menso al la rekoneblo de iliaj “propraj” normoj, fakto alia, per kiu Esperanto pli utilas al “internacieco” de la nomoj.

5.2. Zorgo por rekoneblo de la formoj en la didaktikaj verkoj

Kvankam ĉi-artikole oni dediĉis la studon preskaŭ nur al kompreno de la (inter)nacia formo de la propraj nomoj, oni tamen kuraĝas rekomendi iujn principojn al la aŭtoroj, kiuj fidele registrante la (inter)naciajn formojn en siaj didaktikaj verkoj (vortaroj, listoj, mapoj), per ili celas la vulgariĝon de la internacia naturevoluo.

En adreso oni evitu kunsribi signojn, kiuj ne troviĝas en originaj formoj, ekz. ne *London’* aŭ *London(o)*, se la nomo ne havas internacian finaĵon; ne *Toled/o* aŭ *Malag/a*, se la finaĵo estas forfalema; kaj oni ne devas dikti pri *Manas/e* aŭ *Manase/*, sed sufiĉas la kompreno de la koncernaj internaciaj normoj.

En geografiaj mapoj estas rekomendinde registri krom-formojn de la nacia propra nomo, eĉ precize de naciaj derivaĵoj, por ke el ili oni facile rekonu la “korpon” de la nomo. Tio donas pli fidindan rezulton kaj eĉ pli konscian liberon ĉe diversaj “korpoformoj” de la nomo, ekz. *Lisboa*, *Lisbonense*; *Honduras*, *Hondureño*; *Guimarães*; *Vimaranense*.

5.3. Profito rezulte de la rekonebleco de la normoj uzataj inter la propraj nomoj.

— Pri la jam vaste uzataj sistemigitaj procedoj.

Estas konata la senkomplika faka uzo de la internaciaj sufiksoj -ano kaj -ismo kaj ankaŭ de la adoptita pseŭdo-sufikso -io (sence areo) en geografio kaj aliaj sciencoj, kiu iras ekde ĝis tre konsista “korpeca parto” en la nomo (ekz. *Bolivio*, *Kolombio*) ĝis ĝia facila ŝanĝebleco en “geograf/io”, aŭ eĉ kiel aldona sufikso en *Meksik(o) + io*, pri kio oni vidu aliloke (*Gomes 1976*).

— Pri la transdoneblo de normoj pri sencelementoj aparte uzataj:

Estas konsiderindaj la kvanto kaj diverseco de tre variaj sencesperimaj elementoj troveblaj en la propraj nomoj, ambaŭ sufiksece kaj prefiksece, “ĉe-korpe” kaj “alkorpe”, kiuj krom alio indikas minimume la koncernan land-, lingv- aŭ kultur-areon de la nomo. Jen pluraj el la multaj ekzemploj: *Hindustan*, *Hamburg*, *Brazzaville*, *Ben Gurion*, *Mac Arthur*, *de Gaulle*, *von Braun*, *Johnson*, *Santa Maria*, *San Georg*, *Don Quijote*.

5.4. “Tra-konkludo”

La celo de tiu ĉi artikolo ne estis — ĉar mi persone ne povis — doni ĉion

preta, sed nur prezenti skizajn nociojn por pristudo, kiujn oni estonte disvolvos, ... se tempo daŭros.

Tamen mi informas, ke konstante sintena bazo de la studo estis ĉiupunkte normiga, maniere ke la gramatikaj funkciaj nomrilatoj de “o” (nomo) substantivo kaj “a” (nomo) adjektivo en la komunlingva strukturo de Esperanto estas unu por alia ĉiam paralele respondaj al la sociaj homrilatoj de (homo) vira kaj (homo) ina, trovataj en la naciaj originaj bazoj, kiuj donis la formelementojn por la kreo de nia Lingvo. Do, rilate, la normojn por la propraj nomoj, oni nur retrove sekvis inversdirekte la trakuritan vojon.

6. Referencoj

Gomes, M. (1975): La karaktero de la geografiaj propraj nomoj. Specife pri la “gento/lando”-sencaj nomoj. — *Scienca Revuo*, 151-158. *Beograd*.

Gomes, M. (1976): La valoro de la geografiaj sufiksoj. - *Scienca Revuo*, 157-166. *Beograd*.

Gomes, M. (1982): Pri laŭeble internacia fonetiko de la nacilingvaj grafismoj por la propraj nomoj en Esperanto-tekstoj. - *Scienca Revuo*, 11-23. Pizo.

As características essenciais dos nomes próprios

Este estudo é o ponto de chegada de outros anteriores desenvolvendo questões diversas a respeito dos Nomes Próprios, principalmente do último que apareceu, que tratou das possibilidades normáticas da sua leitura a partir dos sistemas fonéticos nacionais em que os mesmos têm origem.

A primeira Parte deste agora, dedica-se ao sentido básico dos Nomes Próprios, fazendo-o sob quatro pontos de vista: - Que esses são postos como títulos que distinguem, portanto a causa mesmo para o uso da maiúscula inicial; - Que eles são “próprios”, isto é “seus mesmo” ultrapassando assim os limites da sua nacionalidade de origem; — Que têm função atributiva como epítetos, tal como os nomes adjetivos; - E finalmente, que são como que pronomes, pois que como estes também indicam com precisão os nomes que distinguem entre os outros, comuns. Daí, que os Nomes Próprios são uma classe especial em Gramática, de características internacionais “próprias”.

Na Segunda Parte esses Nomes são analisados segundo a forma dos seus elementos e aí encontra-se que a parte principal - o radical da palavra - é invariável, tem o acento e o seu sentido “próprio”, chamando-se por isso o “corpo” do Nome; e que a outra parte, mem sempre aparecendo, é flexionalmente substituível, chamando-se por isso o “vestido próprio” do Nome. Daí resulta que os Nomes Próprios são diversamente classificáveis segundo a sua forma, em “nús” (de forma nua) ou diversamente vestidos, (masculinos, femininos ou neutros - consoante a sua forma substantiva, adjectiva, ou outra é respectivamente “o”, “a” ou “e”... final).

A Terceira Parte conclue mostrando que até as formas mais discutíveis podem ser normalmente entendidas, chegando-se assim a uma universalidade de entendimento normativo.

Grava oficiala agnosko por Esperanto

Detlev Blanke (Berlin, DDR) doktoriĝis en 1976 per disertaĵo pri komparo de la vortfarado en la germana lingvo kaj Esperanto. (D. Blanke, 1982: Plansprache und Nationalsprache. Einige Probleme der Wortbildung des Esperanto und des Deutschen in konfrontativer Darstellung. - Lingvistische Studien, Reihe A, Arbeitsberichte, Nr. 85, Akademie der Wissenschaften der DDR, Zentralinstitut für Sprachwissenschaft, Berlin. 161 p. Havebla ĉe UEA).

Freŝdate, li akiris la titolon “*doctor scientiae philosophiae*” (*Dr. sc. phil.*) per defendo de dua doktora disertaĵo (la 13-an de februaro 1985): **Bazaj demandoj de la evoluo de planlingvoj — sub aparta konsidero de Esperanto.**

La senato de la scienca konsilantaro de Humboldt-Universitato en Berlino akceptis la laboraĵon kiel “disertaĵon B”, t.e. en kelkaj landoj “habilitacia disertaĵo” aŭ disertaĵo por fariĝi “doktoro de sciencoj” (Sovetio) aŭ “kandidato de sciencoj” (Ĉeĥoslovakio, Hungario). Per tiu en GDR plej alta scienca grado al la sukcesinto estas principe aperta ĉiu scienca universitata aŭ akademia kariero — se ekzistas ŝtata intereso pri la fako.

La ekspertizojn verkis la universitataj profesoroj *Georg Friedrich Meier* el Humboldt-Universitato (komunikad-scienco, ĝenerala lingvistiko), *Johannes Klare* el la sama universitato (romanistiko), kaj *Frank Häusler* el la magdeburga Pedagogia Altlernejo (slavistiko). Verŝajne la unuan fojon en la historio de lingvo-scienco oni donis tiun gradon por la fako “interlingvistiko”. Per tio — almenaŭ nomenklature — oni kreis gravan precedenton. La disertaĵo konsistas el du volumoj: I: la teksto (417 + 2p.), II: notaro (pli ol 500 notoj) kaj 2000-titola bibliografio ordigita laŭ 23 sekcioj (kun materialo i.a. el 280 etnolingvaj kaj planlingvaj revuoj).

La sama teksto aperos sub la titolo “*Plansprachen in Theorie und Praxis*” en *Akademie-Verlag Berlin* (1985, mendo-numero 7535643) kaj internacie estos mendebla per la kutimaj libroeksportaj vojoj, aŭ ĉe UEA kaj GDREA. Prezo: ĉirkaŭ 25 markoj. En GDR mendojn akceptas la kutimaj librovendejoj.

Valoras substreki, ke temas pri libro traktanta ne precipe Esperanton, sed precipe la planlingvistikon. Ĉirkaŭ 75% de la tekstoj traktas la planlingvan fenomenon kun ĝiaj diversaj aspektoj kaj nur 25% aparte Esperanton. 33%